

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj. Ni vidis, ke Hector Hodler ekzamenis, ĉu vere esperanto estas la bona internacia lingvo. Kun Edmond Privat li lernis kaj provis praktiki la konkurencajn projektojn Idiom Neutral kaj Blua Lingvo. Ni konstatis la pasintan semajnon, ke la Blua Lingvo de Léon Bollack estis vortare tro dependa de sia aŭtoro por kapabli ekvivi. Hector Hodler kaj Edmond Privat rapide konvinkiĝis, ke ili troviĝis antaŭ mortnaskito.

A.- Ili konstatis, ke ankaŭ Idiom Neutral estis fantomo. Tiu projekto dependis de la konstanta ŝanĝemo de la eksvolapŭka akademio **Kadem bevünetik volapŭka**, kiun prezidis Waldemar Rosenberger ĝis 1898 kaj ekde tiam de A. Holmes. Tiu akademio fariĝis la **Akademi Internasional**, kies cirkuleroj ĉefe raportis pri lingvaj diskutoj. Hector Hodler rapide konvinkiĝis, ke ekster esperanto li nur trovos prilingvajn diskutemulojn. Li volis rilati kun agemuloj por provi starigi efikan tutmondan movadon. Por li la internacia lingvo estis pli ilo ol abstrakta celo.

Cl.- Ni plurfoje aŭdis Edmond Privat raporti pri tiu eksperimentado de Idiom Neutral. Kaj li ĉiam diris, ke ĝi konvinkis ilin, ke la naturalismo estas glita vojo, kies elirejo nur povas esti jam ekzistanta lingvo.

A.- Post Idiom Neutral estis proponita de Giuseppe Peano la lingvo **Latino sine flexione**. Jam en 1904 oni ekparolis pri tiu projekto, kiu iom post iom nomiĝis **Interlingua**.

Cl.- Sed la sorto de tiuj lingvo-projektoj estos efemera. Jam en 1922 Edgar von Wahl faros novan proponon sub la nomo **Occidental** kaj en 1951 Alexander Gode lanĉos novan proponon, laŭ li vere sciencan, ree sub la nomo **Interlingua**. Kaj nun en la rondo de la adeptoj de la naturalismo oni diskutadas por trovi ankoraŭ pli bonan solvon aŭ pli naturan lingvon.

A.- Sed dum tiu tempo la esperantistoj agas. Ili uzas sian lingvon, kaj pro tio ĝi fariĝis natura lingvo.

Cl.- Oni povas sin demandi, kiel Hector Hodler kaj Edmond Privat, kiuj en 1903 tiam estis nur 15 kaj 13 jaraĝaj, povis esti informataj pri la lingvoj konkurencaj al esperanto. En la esperantistaj medioj oni ĝenerale silentis pri ili.

A.- La respondo al tiu demando estas tre simpla. En Ĝenevo tiam vivis maljuna filozofo nomata Ernest Naville, kiu interesiĝis pri la demando lingvo internacia. Li ricevadis dokumentojn en plej diversaj lingvoj : Volapŭk, Esperanto, Idiom Neutral, La Blua Lingvo. Tuj kiam li eksciis, ke en Ĝenevo gimnazianoj, nomataj Hodler kaj Privat, redaktadas gazeton titolita *Juna Esperantisto*, tiam Ernest Naville decidis viziti tiujn junulojn. Tiu vizito okazis antaŭ la unua Universala Kongreso, kaj ekde tiam niaj junaj herooj devis ĉiusemajne viziti la naŭdekjaran filozofon, por raporti al li pri la progresoj de esperanto.

Cl.- Tiuj regulaj kontaktoj kun la ĝeneva filozofo Ernest Naville estis ege riĉigaj por Hector Hodler kaj Edmond Privat. En memoraĵoj bedaŭrinde neniam finverkitaj Edmond Privat komencis rakonti pri tiuj brilaj horoj. Ni tradukas kelkajn erojn el tiu teksto verkita en la franca :

A.- « Dektrijaraj ni korespondadis kun Finnlando kaj Balkanaj landoj, Ĉinio kaj Japanio. En subtegmentejo ni starigis la redaktejon de la gazeto **Juna Esperantisto** kaj la lesivaĵoj en la pluvaj tagoj, kiuj pendis el ŝnuroj, faligis mortigajn gutojn sur la bluan inkon de la manuskriptoj. »

Cl.- Kaj jen kiel Edmond Privat priskribas la unuan kontakton kun la filozofo Ernest Naville :

A.- « *La maljunulo kun grandega kaj glata kranio venis persone ekzameni la redaktantojn en mallongaj kulotoj, kaj de tiam, unu fojon ĉiusemajne, je la gimnazia eliro, ni devis kuri al lia fama laborĉambro por fari al la filozofo sidanta malantaŭ kolumnoj da libroj fidelan agadraporton.* »

Cl.- Ernest Naville volis esti plej detale informata. En la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds ni posedas leteron, kiun li sendis al Edmond Privat la 8-an de aŭgusto 1905 por ricevi informojn pri la unua Universala Kongreso. Jen kion li skribis al nia junulo, kiu tiam troviĝis en Boulogne-sur-Mer :

A.- « *Mi bone ricevis vian leteron, mia kara Esperantisto, kaj mi legis ĝin kun granda intereso. Ĉar ĝi atingis min hieraŭ je la horo de la granda bankedo*

Cl.- temas pri la bankedo en Boulogne-sur-Mer

A.- *kaj ĉar ĉi tie ni ne havas telegrafstacion, mi ne povis sendi telegramon. Mi ne havas ĉi tie la programon de la festo,*

Cl.- temas pri la Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer

A.- *kaj mi ne scias, kiam vi reestos hejme. Se doktoro Zamenhoff [tiel] traveturos Ĝenevon ĉirkaŭ la 15-a de aŭgusto, mi opinias, ke ankaŭ mi estos tie ĉi. Mi do petas vin, se tio estos ebla, konsili al la doktoro min viziti, kvankam mi estas nura aprobanto. Vi proponos al li veni kun li, kaj li trovos en la ĉaledo Grange Gaby, ne bankedon 200-teleran, sed du lokojn ĉe nia familia tablo : unu por li kaj la alia por vi, tio je meztage kaj duona horo, centra horaro. Vorto sendita matene al mia adreso Cours des Bastions en la urbo alvenas ĉe mi la vesperon, tio je la merkredoj kaj sabatoj. La aliajn tagojn oni skribu al mi tra la franca poŝtejo Monetier-Mornex. Ĝis revido ! Ernest Naville.*

Cl.- Ernest Naville skribis al Edmond Privat kaj ne al Hector Hodler, ĉar Hector ne povis ĉeesti la kongreson en Boulogne-sur-Mer. Dum la ferioj li devis ludi la rolon de pozisto por la patro, kiu estis pentristo. Sed ni povas esti certa, ke similajn leterojn li ofte ricevis de la ĝeneva filozofo.

A.- Ĉu la konkurencaj lingvoj estus povintaj alporti kontaktojn tiel riĉigajn al niaj du junaj herooj ? Certe ne, kaj tion ili bone komprenis.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-